# Boletín

Del Grupo Esperantista **Fido kaj Espero**

Mayo-Junio

**Año 2009** **Nº 236B**



Dirección Postal: Apartado, 119; 47080 VALLADOLID

Adherido a la Federación Española de Esperanto


## Editorial

Cuando este ejemplar del Boletín del Grupo Esperantista de Valladolid, llegue a vuestras manos, estaremos próximos a las fechas en que los esperantistas españoles somos llamados a asistir a algún congreso o reunión esperantista, de los muchos y variados que se celebrarán tanto en España, como en el extranjero.

La ciudad de **Málaga,** capital de la Costa del Sol, será la sede del 68 Congreso Español de Esperanto, durante los días 2 al 5 del próximo mes de julio. Durante los días de duración del mismo, destacados esperantistas hablarán, naturalmente en Esperanto, sobre diversos temas, alguno de ellos, de completa actualidad.

También en el mes de julio, pero a finales, tendremos ocasión de practicar el idioma, participando en el 94 Congreso Universal de Esperanto, que, al coincidir con el 150 aniversario del nacimiento del iniciador del idioma, el oftálmologo Lázaro Luis Zamenhof, se celebra en su ciudad natal **Byalistok**.

De ambos Congresos, aunque brevemente, os hemos informado en anteriores boletines, pero somos plenamente conscientes que, todos aquellos que tienen acceso a Internet, han podido, si así lo han querido, disponer de una información mucho más amplia y detallada.

# EEU KONGRESO EN HERZBERG


Peter Zilvar (maldekstre) kaj Zsofia Kóródy (centre) klarigante pri la agado de IEC en Herzberg Ifoto HU)

La 8-a Eúropa Esperanto-Kongreso okazis ĉijare en la bela germana urbeto **Herzberg**, kien ni alvenis la 27-an de majo. En la momento atingi la stacidomon, ni jam restis surprizitaj, ĉar apud la nomo de la urbo, aperis ankaú la kromnomo "la Esperanto-urbo". Antaú vojaĝi tien ni jam sciis ke Herzberg estis nomata "la Esperanto-urbo" sed ni ne pensis ke tiu titolo kunportos ke pluraj indikiloj en la urbo aperas en Esperanto, ke en pluraj restoracioj, ni povis mendi la manĝaĵojn per la "esperanto-karto" tio estas la tuta karto de la restoracioj tradukitaj al Esperanto, kaj konsekvence ke en kelkaj restoracioj la deĵorantoj salutis al la esperantistaj klientoj en nia komuna lingvo.

Jam promenante tra la centro de la urbo, en la fasado de la malnova urbodomo, nuntempe la turisma oficejo, aperas granda afiŝo kun la frazo "*Bonvenon en Herzberg, la Esperanto.urbo*". Se al tio ni aldonas ke la Urbestro, S-ro Gerhard Walter, kiu venis inaúguri la Kongreson kaj kiu aperas en la oficiala afiŝo de la Kongreso kune kun la kongresorganizantoj, estas tre favora al Esperanto, oni povas kompreni ke ni sentis nin ekde la unua momento en esperantista etoso. Sed ankaú ni devas agnoski ke ĉio antaúe di... e estas sukcesoj de pluraj laboremaj esperantistoj, kiuj ekde S-ro Giessner, jam forpasinta, ĝis la nunaj Peter Zilvar, Zsofia Kóródy kaj aliaj, fervore aktivis tiucelen.

Pri la Kongreso, okazinta en moderna Gimnazio, ni elstaros diversajn interesajn prelegojn, ĉefe tiun de D-ro Sean O´Riain (Prezidanto de EEU), teatran vesperon tre amuza pri "Münchhausen, la vera kazo"(pupteatro de Christoph Frank), la koruson *Szená-Torok* de la hungara parlamentanoj, la infanajn dancensemblojn el Toruno, ktp.


La unua rigardo tra la urbo, ni faris komune, gvidataj de lokaj esperantistoj kiuj kondukis nin al diversaj stratoj por vidi la multajn belajn tramdomojn, la kastelon kaj ĝian muzeon kaj esperantan eksposicion. Ankaú ni vidis la Internacian Esperanto-Centron, kie la lokaj esperantistoj aranĝas seminariojn kaj kursojn.
Estis tre interesaj la ekskursoj programitaj por la kongresanoj: Unue al **Goslar**, irante tra la Harz montaro, en kies pinto ni ĝuis belan panoramon, kaj promenante tra la belega urbo kiu estis proklamata de Unesko, "*mondkultura heredaĵo*". Merkrede, ni ekskursis al **Braunschweig**, vizitante la historian malnovan parton de la urbo kaj interesan muzeon.

Ekumena diservo okazis sabate en la katolika preĝejo Sankta Josefo, kuncelebrata de katolika pastro kaj luterana pastoro, kun ĉeesto de multaj kongresanoj kaj kelkaj urbaj enloĝantoj.
Kurioza kaj gaja afero por ni estis la urba festparado okazinta dimanĉe, kie partoprenis la diversaj grupoj de ĉasistoj, bele vestitaj, ornamitaj ĉevalĉaroj, aroj da infanoj, kaj la esperantistoj portante verdajn pluvombrelojn kun la vorto "Esperanto" kaj diversnaciajn flagojn, inter ili estis la hispana. Muziko akompanis la paradon kiu trakuris la tutan urbon.

Tre taúga estis la kongrestemo "*Esperanto por multkultura Eúropo*", ĉar en tiu evento kiu okazis kune kun la Germana Esperanto-Kongreso, partoprenis pli ol 300 esperantistoj el 28 landoj, el diversaj kulturoj, kun kiuj ni povis babili pri diversaj temoj, konstatante, unu plian fojon, la internaciecon de Esperanto.

**M.Rafaela Urueña**

# Centenario del Congreso Universal en Barcelona




Salvador Aragay, presidente de Barcelona Esperanto Centro, hablando en la inauguración de la exposición. (foto HU)

Hace cien años que 1.500 esperantistas de todo el mundo, se reunían en la Ciudad Condal, para, con asistencia del Dr. Zamenhof, celebrar el V Congreso Universal de Esperanto.

Con este motivo las entidades esperantistas ubicadas en Barcelona, lo han conmemorado con diversos actos.

Entre las mismas, Barcelona Esperanto Centro, que en su sede del *Centre Civic Casinet*, situado en las cercanías de la estación de RENFE_Sants, organizó una exposición, en la que se mostraban, cárteles de diversos Congresos, tanto nacionales como Universales; ejemplares de Boletín, y, especialmente, fotos de dicho Congreso en las que se podía ver al Dr. Zamenhof.

La exposición, abierta al público en general, se encontraba en una sala, a nivel de calle, de fácil acceso, lo que facilitaba el que pudiera ser visitada por cuantas personas lo desearan.

La inauguración de la misma tuvo lugar el 12 de mayo, a las 7 de la tarde, con la asistencia de destacados esperantistas, entre los que citaremos a los sres. Serrano, Galofré, Martí Guerrero, Mas, etc y especialmente, desplazados desde Valladolid para la ocasión, Rafaela Urueña, ex Presidenta de la Federación Española de Esperanto y Luis Hernández. Tras unas palabras, en catalán, del Sr. Aragay, en un agradable y distendido ámbiente, fuimos amablemente obsequiados con un *"pica-pica"* por parte de los organizadores.

Durante los días que duró la exposición, del 12 al 24 de mayo, hubo otras actividades, tales como conferencias, proyecciones cinematográficas, etc.

Dentro del ciclo de conferencias, citaremos la pronunciada en Esperanto, bajo el lema ***Esperanto y la diversidad lingüística***, el 13 de mayo a cargo de la Prof. Rafaela Urueña.

De la Exposición se informó mediante un folleto editado por el Ayuntamiento de Barcelona, en el que se informaba de las exposiciones del Centre Casinet durante el período marzo-julio del presente año.


Por su parte, Barcelona Esperanto Centro, distribuyo entre los esperantistas y simpatizantes, unas hojas, tanto en castellano como en catalán, con información detallada de todos los actos a celebrar.

En resumen, una serie de actos, preparados con ilusión y entusiasmo, para conmemorar, dignamente, el Primer Congreso Universal de Esperanto, celebrado en nuestro País.

**L. Hernández**

# Tra la Mondo

## "Platero kaj mi" en esperanta traduko de Liven Dek





***Oni prezentos ĝin okaze de la Hispana kaj Andaluzia Kongresoj en Malago***

La fama verko de la hispana nobelpremiito Juan Ramón Jimenez, oni prezentos al la esperantista mondo, dum la Hispana kaj Andaluzia Kongresoj de Esperanto, kiuj, samtempe, okazos en Málaga de la 2ª ĝis la 5ª de julio.

La tradukinto estas Liven Dek, kaŝnomo de hispana esperantisto, loĝanta en la nordo de Hispanio. (el la retpaĝo de HEF)

## Poezio kondukas Esperanton al Majorka universitato



La kataluna kaj esperantlingva verkisto Abel Montagut

La 3an kaj 4an de junio okazis en Majorko la 11-a Poezi-Festivalo de Mediteraneo. Ĉi-jare la organizantoj invitis unuafoje ankaŭ poeton, kiu verkas en Esperanto - Abel Montagut. Li estis multfoje intervjuita en lokaj amaskomunikiloj. Entute partoprenis dek kvar poetoj, esprimantaj sin en dek lingvoj: la angla, dana, Esperanto, galega, hungara, itala, kastilia, kataluna, malta kaj. slovena. En la tago de la inaŭguro aperis artikolo pri la historio de Esperanto en Majorko en la ĉefa ĵurnalo de la insulo. Sekvos dudekhora kurso pri Esperanto en la loka universitato (el Libera Folio)

## ALTNIVELA AKCEPTO POR LA DELEGITARO DE UEA ĈE UNESKO

Tripersona delegitaro de UEA estis tre varme akceptita en Unesko lundon, la 8-an de junio. Ĝi konsistis el la konstantaj Unesko-reprezentantoj de UEA Barbara Despiney kaj François Lo Jacomo kaj el eksprezidanto Renato Corsetti. Antaŭ la vizito, prezidanto Probal Dasgupta sendis al Unesko detalan raporton pri la kontribuo de UEA al la Internacia Jaro de Lingvoj en 2008. La temaro de la Jaro estis multmaniere pritraktata en UEA kaj ĝiaj landaj asocioj. La plej pintaj kulminoj en tio estis la 93-a UK en Roterdamo en julio, kies kongresa temo kombinis la Jaron de Lingvoj kun la 100-jariĝo de UEA, kaj la konferenco en la Pariza sidejo de Unesko en decembro, kiu samtempe fermis la Jaron de Lingvoj kaj malfermis la Zamenhof-jaron (Gazetara Servo De Uea)

# Humoro




***Bonan Solvon***

- Sciu, mi trovas rimedon por ekriĉiĝi!
- Bonege, sed vi jam prunteprenis de mi.

Ĉu prava plendo?

Leganto venis bibliotekon kaj ĉagrenas:
- Mi prenis de vi la libron "Kiel gajni milionon", sed en tiu mankas duono da paĝoj.
- Ne bedaŭrindas. Duono da miliono estas ankaŭ bonega monkvanto







## Noticia Reciente

Un chico vendiendo periódicos gritaba:
¡Extra, extra, 48 personas estafadas en un día!
Un señor que estaba cerca le dice:
Por favor, déjeme uno.
El chico le entrega el periódico al señor y sigue gritando:
¡Extra, extra, 49 personas estafadas en un día!

## Por si acaso

Camarero, he encontrado un pelo en la sopa y no es mío

No sé preocupe, lo guardaremos,
por si vienen a reclamarlo



## 17-a INTERNACIA ESPERANTO – SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO 2009
## 3-10 oktobro 2009

HOTELO STELLA & SPA ***. STRATO DE LES PUNTAIRES, 1 08397 PINEDA DE MAR

Ĝi situas en la centro de la urbo. 150 metrojn de la strando kaj 8 minutojn piede de la stacidomo. Ĝi estas ekipita kun la plej modernaj servoj. Saŭno, turka banejo,"jakuzi"., klimatizita banejo interne. Vapora banejo. Banejo ekstere, ampleksaj ĝardenoj ktp. (iuj de ĉi tiuj servoj estas aparte pagendaj) La manĝservo estas memserva. pliaj informoj: Luis Serrano Pérez. Apartado 423. 08200 ES-Sabadell. Hispanio. Tel. (34) 93 727.50.21 Rete: luis_serrano@mixmail.com kaj luis_serrano@ya.com

PERIÓDICO

GRUPO ESPERANTISTA
Apartado, 119
47080 VALLADOLID